

LUKIANO

LUKIO AŬ AZENO

el la helena tradukis
GERRIT BERVELING

2a eldono
– 1988 –



CHAPECÓ - SC, BRAZILO

tiun ĉi tradukon mi kore dediĉas al

s-ro itô kanzi

okaze de lia 70-jariĝo (jan. '88).

ENKONDUKO

Lukiano el Samosato vivis de antaŭ 120 ĝis post 180 p.Kr. Li naskiĝis en nuna Sirio, lia gepatra lingvo nepre ne estis greka. Origine li intencis fariĝi skulptisto, sed pro sia bona scio pri la greka li fariĝis aŭtoro. Certan tempon li laboris kiel retoro, verkisto de oratoraĵoj laŭ mendo. Sed ennaskita sincereco ĉe tio lin ĝenis, kiam li devis defendi iun kontraŭvole.

Li fariĝis filozofo, ekloĝis en Ateno, eble 40jara. Sed profunda filozofo neniam li fariĝis. Poste li eklaboris en Egiptio.

Liaj verkoj dividiĝas, laŭ H. J. Rose, jene:

1. Retorikaj ekzerciĝoj.
2. Verkoj pri literaturaj temoj.
3. Kvazaŭ-filozofiaj traktaĵoj. Verŝajne liaj plej karakterizaj verkoj. Ofte en formo de dialogoj; ankaŭ la *Dialogoj de la mortintoj* tie ĉi klasiĝu, kaj la *Disvendado de vivoj* (satiro pri filozofiaj skoloj).
4. Satiraĵoj. Ekz-e *Dialogoj de ĉiesulinoj*, *Dialogoj de l' dioj*, aŭ la akraj ridindigoj de religiaj “profetoj” kiel Aleksandro el Abonutiĥo aŭ Peregrino.
5. Miksaĵoj. Inter ili ankaŭ mallongigo kiun laŭdire Lukiano faris el romano fare de Lukio el Patraĵo: *Lukio aŭ Azeno*.

La temo, kiun traktas *Lukio aŭ Azeno*, retroveblas en famega, stile terure komplika romano latina fare de Apulejo — *Metamorfozoj*. (Dua duono de l' 2a jc p.Kr.)

Apulejo supozeble uzis kiel inspiron la saman originan verkon de Lukio el Patrajo, kiun mallongigis Lukiano. Tamen, la latina romano fariĝis plene memstara verko: ekz-e ĝi preskaŭ pie finiĝas: la ĉefulo fariĝas pia adoranto kaj eĉ konsekrito de Izisa. La plej fama diferenco, krom la amplekso (pli-malpli 1:12 aŭ pli), estas, ke Apulejo enŝovis en sian verkon plurajn mallongajn rakontojn kaj unu vere longegan: temas pri la unua fabelo latina: pri Amoro kaj Psiĥa.

En pli posta tempo, Apulejon oni tre aprezis, ofte imitis, sed malofte superis. Certan famon akiris ekz-e la nederlanda romano *De verliefde ezel* (La enamiĝinta azeno) de L. Couperus (1863–1923).

La tekston de la Lukiana *Azeno* kutime oni ne konas.

Gerrit Berveling

1. Foje mi vojaĝis al Tesalio; aferon de mia patro mi tie havis kun homo tiuregiona; ĉevalo transportis min kaj la pakaĵon, kaj unusola servisto min akompanis. Mi do vojaĝis la elektitan vojon; kaj hazarde tie estis ankaŭ aliaj viroj survoje al Hipato, urbo tesalia, de kie ili devenis. Ni salon dividis*, kaj tiel ni pluiris tiun penigan vojon kaj jam alproksimiĝis la urbon, kiam mi demandis la Tesalojn, ĉu ili konas viron loĝantan en Hipato, Hiparĥon laŭnome. Mi kunportis de l' hejmo leteron por li, por gastloĝi ĉe li. Ili diris, ke ili konas Hiparĥon, kaj ankaŭ, kie li loĝas en la urbo, kaj ke li havas sufiĉe da mono, sed ke li nutras sole nur unu servistinon kaj la edzinon; li ja ege mon-amantas. Kiam ni alproksimiĝis pli al la urbo, tie estis ĝardeno kaj ene dometo agrabla, kie loĝis Hiparĥo.

2. Ili min do salutis kaj foriris, mi aliris la pordon kaj ĝin frapis, kaj lante kaj malrapide iu virino montriĝis aŭskulti, kaj eĉ eliris. Mi demandis, ĉu Hiparĥo estas ene. "Ene", ŝi respondis; "sed kiu vi kaj kial tion demandas?"

"Mi venas kun letero al li de Dekriano, la saĝulo el Patraĵo".

"Atendu tie ĉi", ŝi diris, fermis la pordon kaj foriris denove; fine elirinte, ŝi petis min, eniri. Mi eniris, salutis lin, kaj transdonis la leteron. Li ĵus estis manĝonta, kuŝante sur streta lito*, lia edzino sidis apude, kaj malplena tablo staris antaŭ ili. La leteron leginte, li diris: "Dekriano vere

estas mia plej bona amiko, la plej bona de ĉiuj Grekoj, kaj li agas bone, ke plenkonfide li sendas al mi siajn amikojn; sed, Lukio, mian dometon vi ja vidas, kiel eta ĝi estas, sed ĝi estas danka gastigi vin; loĝante ĝin tolereme, vi faros ĝin larĝa loĝejo.” Kaj li vokis la servistinon: “Palestra, donu la duan dormĉambbron, kaj prenu lian pakaĵon tien kaj poste sendu lin al la banejo; ĉar li venis ne etan vojon.” **3.** Post tiuj liaj diroj, la knabinjo Palestra min kondukis kaj montris beletan ĉambbron kaj diris: “Vi kuŝos sur tiu lito, por via knabo mi metos faldeblan liton tien kaj kusenon sur ĝi.” Kiam tion ŝi diris, ni foriris por baniĝi, paginte al ŝi la hordeon por la ĉevalo; ŝi enen transportis ĉion por ni. Postbane ni returniĝis, kaj Hiparĥo salutis min kaj invitis min kunalkuŝiĝi* ĉe lia flanko. La manĝo neniel estis ŝparema; la vino dolĉa kaj maljuna. Post kiam ni manĝis, estis trinkado kaj parolado kiel kutime kiam ĉeestas gasto, kaj konsuminte tiun vesperon ĉe l’ trinkado, ni enlitiĝis. La sekvan tagon Hiparĥo demandis min, kien mi nun iros kaj ĉu mi restos ĉiujn miajn tagojn ĉe li.* “Mi foriros”, mi diris, “al Lariso, sed tie ĉi mi pasigos tri aŭ kvar tagojn, mi pensas.”

4. Sed tio estis preteksto. Fakte mi ja deziregis resti tie por elspuri iun virinon sciplenan pri sorĉado, kaj spekti ion neordinaran: homon flugantan aŭ ŝtoniĝantan.

Fordoninte min al deziro je tiaj vidaĵoj, mi ĉirkaŭiris la urbon, necerta kie komenci mian serĉadon, tamen mi ĉirkaŭiris; kaj tiam jen virinon mi vidas alproksimiĝi ankoraŭ junan, bonhavan, kiom juĝeblis je la surstrata vido: vestaĵoj florplenaj, multaj sklavoĵoj, kaj tro da oraĵoj. Kiam mi alproksimiĝis, la virino min alparolis, kaj mi respondis al ŝi sammaniere; ŝi diris: “Abroja mi estas, se vi aŭdis pri amikino tiunoma de via patrino; kaj vin filojn ŝiajn mi amas same kiel tiujn kiujn mi naskis mem: kial vi ne ekloĝas ĉe mi, mia infano?”

“Mi tre dankas vin”, mi diris, “sed mi hontus nun forfuĝi el la domo de amiko, al kiu nenion mi havas por riproĉi. Sed, mia kara, ĉe vi mi restos en spirito”.

“Kie vi do gastas?”, ŝi diris.

“Ĉe Hiparĥo”.

“Ĉe tiu mon-amanto?”, ŝi diris.

“Neniel tion vi diru, panjo”, mi diris. “brile malavara li estis al mi;

oni eĉ povus riproĉi al li malŝparemon.”

Ŝi ridis, prenis mian manon, flanken kondukis min kaj diris al mi: “Atentu pro la edzino de Hiparĥo, kiom vi povas; ĉar terura magiistino ŝi estas kaj volupta kaj sur ĉiujn junulojn ŝi ĵetas la okulojn; kaj se iu ne volas obei al ŝi, tiun per sia arto ŝi punas, kaj multajn ŝi jam ŝanĝis en bestojn, dum aliajn ŝi plene neniigis; kaj vi, infano mia, estas juna kaj bela, do unuavide vi plaĉos al tiu virino — kaj, kiel fremdulo, vi ja estas neatentindaĵo tie ĉi.”*

5. Aŭdinte, ke kion delonge mi serĉis, hejme estas apud mi, mi tute ne plu interesiĝis pri ŝi. Kiam fine mi forliberiĝis de ŝi, mi iris hejmen, dirante al mi mem survoje: “Nu, vi, kiu arogas deziregi tiajn nekredeblajn vidaĵojn: veku vin mem kaj eltrovu saĝan metodon por atingi kion vi volas; senvestiĝu por lukti kun la servistino Palestra* — ĉar vi detenu vin de la edzino de via gastiganto-amiko — kaj ruliĝinte kaj ekzerciĝinte kun ŝi, facile vi ekscios kion vi deziras scii: sklavoj ja scias ĉion bonan kaj malbonan.”

Tiel parolante en mi mem, mi eniris la domon. Hiparĥon mi ne trafis hejme, nek lian edzinon, sed Palestra estis okupita ĉe la fajrejo preparante nian vespermanĝon. **6.** Kaj tuj mi atakis: “Kiel ritme, bela Palestra, vi movas kaj klinas la pugon samtakte kun la kaldrono! La talio, je Dio, kiel leĝere balanciĝas! Feliĉa la viro, kiu tien la sian povas trempi.”

Ŝi, ĉar knabineto ŝi estis nebarita kaj plej alloga, diris: “Knabeto, vi fuĝus, se sencon vi havus kaj ŝatus plu vivi: ja estas plene je multa fajro kaj brulodoro! Se ĝin vi nur tuŝus, kun via fajra brulvundo vi eĉ ne povus foriĝi, kaj neniu vin sanigus, eĉ ne la Dio Sanigisto mem, krom sole nur mi, kiu vin bruligis; kaj plej paradokse, mi igos vin eĉ deziri suferi pli, kaj ĉiam vi submetiĝos al mia dolora kuracado kaj, eĉ se per ŝtonoj oni vin ĵetos, vi neniel fuĝos ĉi dolĉan torturon. Kion vi ridas? Veran virbuĉistinon vi alrigardas. Ĉar ne nur ĉi tiujn normalajn manĝaĵojn mi preparas, sed ankaŭ rilate tiun grandiozan kaj bonegan frandaĵon — la viron — mi ja scias kiel buĉi kaj senhaŭtigi kaj dispecigi ĝin, kaj prefere la intestojn kaj la koron mi ekprenas.”

“Kion vi diras, estas vera”, mi diris, “ĉar jam defore kiam mi ankoraŭ ne apudiĝis, vi atakis min ne nur per brulvezikoj sed per kompleta bruligo, je Dio! Kaj tra miajn okulojn vi enĵetis vian nevideblan

fajron en miajn intestojn — kaj tiel min rostas, kvankam nenion mi misfaris; tial je la Dioj: sanigu min per tiuj amaraj-dolĉaj kuracadoj, kiujn vi menciis; vi jam buĉis min — nun do sennaŭtigu, kiel vi mem ja deziras.”

Post tio, laŭte kaj agrablege rideginte, por la estonto ŝi estis mia, kaj interkonsentiĝis je ni, ke tuj kiam la gemastrojn ŝi estos akompaninta litten, ŝi venu al mi por dormi kun mi. **7.** Kaj kiam alvenis Hiparĥo, ni lavis nin kaj manĝis, kaj dum nia konversacio estis multa trinkado... Poste mi ŝajniĝis dormemon, stariĝis kaj fakte foriris al la ĉambro kie mi loĝis. Tie ene, ĉio estis bonege preparita: por mia knabo lito pretis ekstere, tablo staris ĉe mia lito kun pokalo; kaj vino staris apude kaj akvo pretis — frida kaj varma*. Ĉio tio estis preparita de Palestra. Sur la litkovriiloj, dissemataj kuŝis rozoj, kelkaj simple senarte nudaj, aliaj kunigitaj, aŭ plektitaj en kronon. Kaj ĉar rni trovis ĉion preta por nia “simpozio”, mian kunfestantinon mi atendis. **8.** Tuj kiam la mastrinon ŝi enlitigis, rapide ŝi hastis al mi, — kaj estis gajeco, dum ni tostis reciproke vinon kaj kisojn! Kiam sufiĉe ni preparis nin per la vino por la nokto, Palestra diris al mi: “Tion ĉi vi ĉiel devas bonege memorteni, knabo, ke vi kuntrafis je Palestra: nun vi do montru, ĉu inter la efeboj vi iĝis timinda, kaj ĉu multajn luktopozojn vi jam lernis.”

“Tiun ĉi elprovon vi ne vidis min fuĝi; senvestiĝu do kaj ni laktu.”

“Laŭ mia deziro”, ŝi diris, “demonstru vian lertecon; role de trejnisto kaj gvidisto mi nomos la luktopozojn, do vi estu preta por obei kaj fari ĉion ordonotan.”

“Ordonu”, mi diris, “kaj rigardu, kiel lerte, suple kaj elaste mi luktos.”

9. Ŝi demetis la vestaĵojn, kaj starante tute nuda komencis ordoni: “Knabo, senvestiĝu kaj oleumu vin per tiu mirtaĵo, kaj interplektiĝu kun la kontraŭulino; la du femurojn distirinte klinu ŝin malantaŭen, desupre enmetu tra la femurojn kaj ŝvebu post malfermo, tenu la krurojn supren; malstreĉiĝinte gluiĝu stare al ĝi; ŝtele eniru kaj ataku, kaj skue piku ĉie ajn ĝis ŝi elĉerpiĝos; la talio montriĝu fortika; poste retiriĝu kaj larĝafronte trafu ingvenen, puŝu antaŭen ĝismure kaj batu; kaj kiam malstreĉiĝon vi rimarkos, ĝuste tiam plej fortike laĉu la lumbojn, kaj provu ne rapidi sed vin regu je sama galopo. Nun plenumu la taskon.”

10. Kiam senpene mi ĉion obeis, kaj nia luktado finiĝis, mi diris ridante al Palestra: “Trejnisto, vi vidas do, kiel lerte kaj obee mi luktis, sed atentu ke vi tenu la pozojn orde; ĉar vi ordonas unu super la alia.”

Sed ŝi frapis mian tempion kaj diris: “Kiel babileman lernanton mi havas! Atentu do, ke vi ne ricevu pli da frapoj, se vi plenumus aliajn ol la ordonitaj luktopozoj.”

Post tiuj vortoj ŝi ekstaris kaj refreŝiginte sin, ŝi diris: “Nun montru, ĉu vi estas juna kaj fortika luktisto kaj ĉu vi scias lukti aktive surgenue.”

Ŝi surlite falis surgenuen kaj: “Venu do, sinjoro luktisto: jen la centro; skue la akran profunden enpuŝu. Vi vidas ĝin nuda tie preti, kaptu la okazon; unue kompreneble streĉe ŝnurligu, poste faldante enmetu, eltenu kaj ne lasu aperturon. Kaj kiam vi perdas rapidon, pli haste avancu pli supren kaj kurbante la kapon ekfrapu, kaj atentu ke vi ne pli rapide suprentiru ol ordonite, sed larĝe arkiginte ĝin retiru, kaj tiam la batallinion ree suben puŝu, tenu kaj movu — kaj poste fortiru ĝin; ĉar ĝi plene falis, elĉerpiĝis — kaj via kontraŭulino iĝis pura fluidaĵo.”

Nun mi laŭte ridegis kaj diris: “Deziras mi mem, trejnisto, ordoni kelkajn luktopozojn: nun *vi* stariĝu kaj obeu* kaj sidiĝu, poste donu akvon por la manoj, prenu mem la restaĵon kaj purigu vin mem, kaj — je Heraklo! — ĉirkaŭbraku min por ekdormi.”

11. En tiaj agrablaj kaj ludemaj luktadoj ni batalis kaj per ĉi noktaj konkursoj ni gajnis glorkronojn, kaj granda estis nia ĝuo pri ĝi; tiel ke mian vojaĝon al Lariso mi plene forgesis. Tiam al mi venis en la menson, pri *kio* mi venis informiĝi kaj mi diris al ŝi: “Karega, montru al mi vian mastrinon ĉe magiado aŭ ŝanĝiĝanta; ĉar jam delonge mi sopiregas je tia nekredebla vidaĵo. Aŭ prefere, se ankaŭ vi scias magii, faru magiaĵojn, tiel ke vi aperos al mi jen en tiu jen en alia formo. Al mi ja ŝajnas, ke vi ne estas sensperta je tiu arto; kaj tio ĉi ne estas informo el aliulo, sed de mia propra animo mi tion ĉi scias, ĉar min (kiun la ceteraj virinoj nomis la malindulga, ĉar al neniu virino mi turnis la okulojn) per via arto vi kaptis, kaj en la erotika milito vi tenas min militkaptito.”

Sed Palestra diris: “Ĉesigu la ŝercadon. Kiu magia ĉanto povas veki la amon: tiu ja estas la mastro de l’ arto! Sed mi, kara, scias nenion pri tio — je via dolĉa kapo* kaj je tiu ĉi lito benata; ĉar mi eĉ ne scipovas legi, kaj mia mastrino estas tre ĵaluza pri sia arto; sed se la ebleco sin

prezentos, mi provos estigi, ke vi povos vidi la mastrinon ŝanĝiganta.”

Kaj post tio ni ekdormis. **12.** Kelkajn tagojn pli poste Palestra sciigis al mi, ke ŝia mastrino intencas fariĝi birdo por flugi al sia amato.

“Nun estas via ŝanco, Palestra”, mi diris, “por fari al mi la komplezon, per kiu vian peteganton vi povos liberigi de longdaŭra sopirado.”

“Kuraĝon”, ŝi diris.

Kaj kiam vesperiĝis, ŝi kunprenis min al la pordo de la ĉambro, kie la gemastroj dormas, kaj invitis min alproksimiĝi al iu fajna fendeto de l’ pordo, kaj rigardi, kio okazas ene. Mi vidis la mastrinon senvestiĝi. Poste nuda ŝi alpaŝis la lampon, prenis du incenserojn, metis tion sur la fajron de la lampo, kaj tie starante ŝi eldiradis multe super la lampo; tiam ŝi malfermis kestegon, en kiu enestis multaj buksaj skatoletoj, ŝi elektis kaj elprenis unu el ĝi; ĝi enhavis mi-ne-scias-kion, sed laŭvide ŝajnis al mi olivoleo. El ĝi ŝi deprenis kaj plene sin priŝmiris, ekde la piedfingraj ungoj, kaj subite plumoj elkreskis el ŝi, la nazo korniĝis kaj fariĝis hokeca, kaj ĉiurilate ŝi ekhavis la atributojn kaj kvalitojn de birdo: ŝi estis nenio alia ol nokta korako... Kiam ŝi rimarkis, ke ŝi plumhaviĝis, ŝi grakis terure kaj ekzakte laŭ tiaj korakoj stariĝis kaj forflugis tra la pordon. **13.** Mi kredis ke mi songas, kaj perfingre tuŝis la palpebrojn, nefidante miajn proprajn okulojn — nek ke tion ili vidas, nek ke ili maldormas. Kiam finfine mi konvinkiĝis, ke mi ne dormas, mi petis Palestran provizi ankaŭ min per plumoj, kaj priŝmiri min per fiu sorĉaĵo por ke ankaŭ mi flugu; mi ja deziris eksperimente sciigi, ĉu ŝanĝiginte el homo mi estos birdo ankaŭ spirite. La ĉambro ŝi ŝtele malfermis kaj alportis la skatoleton. Rapidege mi senvestiĝis kaj priŝmiris min tutan, kaj birdo mi ja ne fariĝis —ho kompatinda!— sed vosto malantaŭe elkreskis kaj ĉiuj fingroj malaperis mi-ne-scias-kien; entute kvar ungojn mi havis, kaj tiuj estis nepre... hufoj, dum miaj manoj kaj piedoj estis bestopiedoj, kaj la oreloj estis longegaj kaj la vizaĝo granda. Kiam mi ĉirkaŭmiris min mem, mi vidis min azeno, kaj homan voĉon mi ne plu posedis por insulti Palestran. Sed la lipon mi pendigis, per tuta mia sinteno kiel azeno mi alrigardis ŝin kolere kaj riproĉis ŝin, kiom eblis, ĉar anstataŭ birdo mi fariĝis azeno. **14.** Ambaŭmane ŝi batis al si la vizaĝon kaj diris: “Ho kompatinda mi, grandan aĉon mi faris; en mia rapidemo mi eraris pro la simileco de l’

skatoletoj kaj prenis la malĝustan — ne tiun kiu kreskigas plumojn. Sed fidu min, karega: kuraco pro tio ĉi estas tre simpla: se nur rozojn vi manĝos, tuj vi forskuos la bestecon kaj mian amanton vi redonacos al mi! Sed, karega, tiun ĉi unu nokton restu en ĉi azenoformo, matene mi haste alportos al vi rozojn — kaj manĝante vi saniĝos.” Tion ŝi diris, karesante al mi la orelojn kaj tutan mian haŭton.

15. Sed kvankam ĉiurilate mi estis azeno, mense kaj spirite mi tamen restis tiu sama homo Lukio — krom la voĉo. Do Palestran mi forte sakris en mi mem pro ŝia misfaro, kaj mordante la lipon mi foriris tien, kie mi sciis ke staras mia ĉevalo kaj alia —vera— azeno de Hiparĥo. Kiam ili min vidis eniranta, timante ke mi enpaŝas por dividi kun ili la furaĝon, ili klinis la orelojn kaj staris pretaj por defendi sian ventron per la kruroj; kompreneme mi iom distanciĝis de la kripo, ridante, sed mia rido estis azenblekado. En mi mem mi pensis: “malbenita scivolemo! Kio, se nun lupu envenus aŭ alia bestio? Mi estas en danĝero sen ajna misfaro mia!” Tiel mi pensis, sed —kompatindulo— mi ne sciis kiu mizero venos.

16. Ĉar dum estis profunda nokto kaj multa silento kaj dolĉa dormado, ekkraketis deekstere la muro kvazaŭ iu perforte trabatiĝas, kaj vere iu trabatis al si perforte, kaj jam jen truo estiĝis kapabla tralasi viron, kaj tuj per ĝi iu viro aperis kaj same alia, kaj multaj jam estis ene kaj ĉiuj havis glavon. Kaj en la ĉambroj ili ŝnurligis Hiparĥon kaj Palestran kaj mian sklavon, la tutan domon ili senĝene malplenigis, forportante eksteren la monon, la vestaĵojn kaj la tutan inventaron. Kiam nenio plu restis ene, ili prenis ankaŭ la alian azenon kaj la ĉevalon, selis nin, kaj ĉion forrabiton ili surligis sur nin. Kaj tiel, pezajn ŝarĝojn portante, ni estis bastonbatate kondukataj, ĉar ili provis laŭ neuzata pado fuĝi tra la montaro. Rilate ambaŭ aliajn bestojn mi ne scias, kiel ili sin sentis, sed mi plene pereis, nudpiede marŝante tiel nekutimaĵojn, tretante sur akraj ŝtonetoj, tiom da ŝarĝoj kuntrenante. Ofte mi stumblis, sed mi ne rajtis fali, ĉar tuj iu demalantaŭe min batis bastone la postkolon. Kiam ripete mi provis krii: “Ho Cezaro!”, nenio alia sonis ol azenblekado: la “O” grande kaj bonsone mi vokis, sed la “Cezaro” neniel postsekvis. Sed fi, eĉ pro tio ĉi oni min bategis, ĉar per mia blekado mi ilin perfidis. Koscia, ke mi sence krias, mi eklernis pluri silente kaj meriti ne-plu-batiĝi.

17. Tiam jam estis tago, kaj multajn montojn ni jam surgrimpis,

niajn buŝojn oni tenis ligitaj, tiel ke ni ne misuzu la vojaĝon per paŝtiĝado matenmanĝe; sekve ankaŭ tiun tagon mi restis azeno. Sed kiam estis precize tagmezo, ni haltis ĉe farmdomo de homoj, kiuj estis iliaj amikoj, se juĝi laŭ kio okazas: per kisoj ili sin intersalutis, kaj la farmloĝantoj invitis ilin ekhalti, kaj ili alportis matenmanĝon kaj por ni, la bestoj, ili metis hordeon. Ili do matenmanĝis, sed mi malsatis mizere; ĉar mi neniam manĝis jam hordeon, mi ĉirkaŭrigardis, kion mi manĝu. Jen ĝardenon mi rimarkis tie malantaŭ la korto, ĝi estis plena je ĉiuspecaj belaj vegetaĵoj kaj speciale rozoj elstariĝis inter ili; nerimarkate de ĉiuj en la domo, ĉar ilin okupis la matenmanĝo, mi iris al la ĝardeno, parte por pleniĝi je krudaj vegetaĵoj, parte pro la rozoj; mi estis konvinkita ke tuj kiam mi manĝos la florojn, mi refariĝos homo. Mi enpaŝis la ĝardenon, kaj min plenigis per laktuko, rafanetoj kaj petroselo — vegetaĵoj, kiujn ankaŭ homo povas manĝi krudaj, sed tiuj rozoj ne estis veraj rozoj, sed ili kreskis el la sovaĝa laŭro; laŭrorozo la homoj ilin nomas* kaj ili formas aĉan matenmanĝon por ĉiu azeno aŭ ĉevalo; laŭdire la manĝinto tuj mortas. **18.** Ĝuste tiam la ĝardenisto rimarkis min kaj kun bastono li envenis la ĝardenon, kaj kiam la malamikon li vidis kaj la ĥaoson en la vegetaĵoj, li fariĝis kvazaŭ severega moŝto kiu freŝafare kaptas ŝteliston, kaj per la ligno li min tiom bategis, nek miajn ripojn nek la flankojn li indulgis, kaj —eĉ pligrave— miajn orelojn li kripligis kaj same mian vizaĝon. Kiam mi ne plu eltenis, mi piedbatis malantaŭen, ĵetis lin surdorsen inter la vegetaĵoj, kaj forfuĝis supren al la monto. Kiam li min vidis forgalopi, li kriaĉis malligi la hundojn post mi; tiuj hundoj estis multaj kaj grandegaj kaj kapablaj batali kun ursoj. Mi komprenis, ke ili min disŝiros, se ili min kaptos, kaj post iom da rapidado tien reen, mi decidis laŭ la diraĵo “prefere kuri reen ol pereen kuri”*. Do mi returniĝis kaj denove eniris la farmbienon. La hundon min sturmantajn ili kaptis kaj ligis, kaj min ili ne ĉesis bati antaŭ ol pro doloro ĉiujn vegetaĵojn ili igis min eligi el la postaĵo.

19. Kaj kiam estis tempo por ekvojaĝi denove, ili surmetis sur min la plejpezaĵojn (ja eĉ la plimulton) de l’ ŝtelitaĵoj; kaj tiel do tiam ni foriris de tie.

Kiam mi komencis elĉerpiĝi pro la batadoj kaj la pezo de mia ŝarĝo kaj miaj hufoj iĝis eluzitaj pro la vojaĝo, mi decidis surloke faliĝi kaj

neniel plu ekstari, kiom ajn oni skurgos min; pri tio mi esperis ke ĝi grande utilos al mi; mi ja supozis, ke ili plene venkiĝos kaj mian ŝarĝon disdividos inter la ĉevalo kaj la mulo*, lasante kuŝi min tie por la lupoj. Sed iu sorĉa diaĵo komprenis miajn planojn kaj plene ilin disturbis; ĉar la alia azeno, kun la sama intenco kiel mi, falis sur la straton. Komence ili ĝin batis bastone, ordonis la povrulon stariĝi, sed ĉar ne venis reago al iliaj batoj, ili ĝin kaptis je la oreloj, aliaj je la vosto, por provi starigi ĝin; sed ĉar nenio efikis, kaj ĝi kuŝis tie nur kiel ŝtono senkonscie surstrate, ili interkonsiliĝis, ke senrezulte ili penas kaj perdas tempon de la fuĝo pro azena kadavro: do la pakajon, kiun ĝi portis, ili disdividis inter mi kaj la ĉevalo, sed la povran kunulon de kaptiteco kaj ŝarĝoportado per glavo ili senigis de la kruroj, kaj ankoraŭ konvulsianta ĝin ili ĵetis en abismon. Ĝi suben flugis en la danco de l' morto.

20. Vidante el la sorto de la kunvojaĝanto kiel finiĝos miaj planoj, mi decidis porti la nunan situacion kiel nobelo kaj ĝoje plumarŝadi, esperante ke kiel ajn foje mi trafos inter rozojn kaj ke pere de tiuj mi resaviĝos al mia memo; de la rabistoj mi aŭdis, ke ne plu restas multa vojaĝado, kaj ke ili restos kie ili tranoktos; rapidpaŝe ni do portis ĉion, kaj antaŭ la vespero ni atingis la stabejon. Ene sidis maljunulino, kaj fajro forte brulis. Ĉion, kion ni alportis, la viroj enmetis. Tiam ili demandis la maljunulinon: “Kial vi sidas tie kaj ne preparas la manĝon?”

“Ĉio pretas”, la maljunulino respondis: “multaj panoj, bareloj da olda vino, kaj ankaŭ rostitan ĉasaĵon mi por vi preparis.” Ili laŭdis la maljunulinon, senvestiĝis, oleis sin ĉe la fajro, kaj el kaldrono da varma akvo ili prenis, kaj priverŝante sin ili tie prenis improvizitan banon.

21. Mallonge poste multaj junuloj alvenis kun giganta amaso da oraj kaj arĝentaj vazoj, vestaĵoj kaj ornamaĵoj por viroj kaj virinoj. Ili estis reciproke partneroj; kaj kiam ĉion ĉi ili demetis, ankaŭ ili prenis banon. Poste sekvis riĉa manĝo kaj multa konversacio ĉe la trinkado de l' murdistoj. La maljunulino antaŭmetis hordeon al mi kaj la ĉevalo; tiu ĉi rapide forglutis la hordeon, timante, ŝajne, pro la manĝokunulo. Sed mi manĝis panon el la domo, ĉiufoje kiam mi vidis la maljunulinon ekstereniri. La sekvan tagon ili lasis knabegon ĉe la maljunulino, kaj la ceteraj foriris por labori. Mi priploris min mem kaj la akran gardiston; ĉar la maljunulinon superruzi mi povis, kaj eskapi ŝiajn okulojn, sed la

knabego estis granda kaj aspektis timiga, kaj ĉiam li portis la glavon kaj ade fermis la pordon.

22. Tri tagojn pli poste ĉirkaŭ noktmezo la rabistoj revenis, sen ajna oro aŭ arĝento aŭ kiu ajn alia afero, nur kun knabino juna, tre bela, ploranta, kiu disŝiris al si la vestaĵojn kaj la hararon; ili metis ŝin enen sur la pajlon, diris ke ŝi ne timu, ordonis la maljunulinon ĉiam resti ĉe ŝi ene, kaj bone gardi la knabinon. La knabino deziris nek manĝi nek trinki, sed daŭre ploris kaj distiris al si la hararon; sekve ankaŭ mi kunploris kun la bela knabino, dum mi staris ĉe la kripo. Intertempe la rabistoj manĝis ekstere en la vestiblo. Je tagiĝo unu el tiuj, kiuj gvatis la vojojn, alrapidis por raporti, ke tie baldaŭ pasos fremdulo kun multa riĉo ĉe si. Ili senplie stariĝis, prenis la armilojn, selis min kaj la ĉevalon kaj forkondukis nin. Sed ĉar mi kompatinda sciis, ke mi kondukiĝas al batalo kaj milito, mi antaŭenpaŝis malvole, tial en sia propra streĉiteco ili min bastone batadis. Kiam ni atingis la vojon, kie pasos la fremdulo, la rabistoj atakis la karavanon, mortigis la mastron kaj ties servistojn, kaj la plej valorajn aferojn selektinte, surmetis tiujn sur la ĉevalon kaj sur min, dum la ceteron de la predo surloke ili kaŝis en la arbaro. Tiam ili pelis nin returnen, sed en la streĉiteco mi bastonbatate kontuziĝis la hufon je akra ŝtono kaj el tiu interbatiĝo mi ekhavis vundon dolorigan; kaj la ceteran vojaĝon mi iris lame. Inter si ili diris: “Kial ni decidu nutri tiun azenon, kiu ĉiam falas? Ni ĵetu ĝin de la krutaĵo — tiun malbonaŭguraĵon.” “Jes”, diris alia: “ni ĵetu ĝin por ke ĝi estu pekofero por nia aro.” Kaj ili ekvolis kapti min; sed mi, tion aŭdante, plue marŝis sur mia vundo, kvazaŭ ĝi estus de iu alia; la timo je l’ morto faris min nealirebla por doloro. **23.** Kiam ni atingis nian tranoktejon, la pakaĵon ili forprenis de niaj dorsoj, kaj bone ĝin formetis, kaj la viroj sidiĝis kaj manĝis. Kaj kiam estis nokto, ili foriris por sendanĝerigi la reston de la predo. Unu el ili diris: “Tiun ĉi fian azenon, kial ni kuntrenas ĝin, senutilan pro ĉi hufo? La pakaĵojn ni parte mem, parte la ĉevalo povos porti.” Kaj tiam ili foriris kun la ĉevalo. Pro la luno, estis nokto ege hela. Tiam mi diris al mi mem: “Kompatindulo, kial vi restas ankoraŭ ĉi tie? Vulturoj kaj vulturidoj vin manĝos. Ĉu vi ne aŭdis, kion ili interkonsiliĝas pri vi? Ĉu vi vere deziras, esti ĵetita de la krutaĵo? Nun estas nokto kaj la luno hela; ili nun estas for; savu vin mem per fuĝo for de tiuj mastroj murdistoj.”

Tion pripensinte ĉe mi mem, mi rimarkis, ke mi ne estas ŝnurligita, sed la rimeno kiu survoje estis treninta min, pendis apud mi. Tio ankoraŭ pli instigis min fuĝi, kaj haste mi elkuris for. La maljunulino, kiam ŝi vidis ke mi pretas forkuri, ekprenis mian voston kaj tenis ĝin. Mi rakontis al mi mem, ke mi meritas la abismon kaj aliajn mortojn, se mi kaptiĝas de maljunulino, kaj kuntrenis ŝin, sed ŝi kriegis la kaptitan knabinon en la domo; tiu aperis, kaj kiam ŝi vidis la aĝan Dirkan* pendi je azeno, ŝi trovis la kuraĝon de senespera junulo: ŝi ja sursaltis min, kaj sidante sur mia dorso rajdis for; kaj mi forhastis je ĉeval-galopo pro mia propra emo je fuĝo kaj pro la rapidigo de l' knabino; la maljunulino estis postlasita. La knabino preĝis la diojn, savi ŝin per ĉi fuĝo; kaj al mi ŝi diris: “Se vi kondukos min al la patro, ho bela, mi liberigos vin de ĉia laboro, kaj ĉiutage via matenmanĝo estos buŝelo da hordeo.”

Esperante eskapi miajn murdontojn kaj atendante multan helpon kaj zorgon de la knabino, kiun mi savis, mi kuregis neatentante mian vundon. **24.** Kiam ni atingis lokon, kie la vojo tridirekten disiĝas*, ni estis kaptitaj de la returniĝantaj malamikoj; en la lunlumo ili tuj rekonis defore la povrajn kaptitojn; alkurinte ili min kaptis kaj diris: “Ho bela kaj bona knabino, kien vi iras malkonvenhore? Ho kompatindulino! Ĉu vi ne timas la spiritojn? Venu do al ni, ni redonos vin al via familio”, sardone ili ridegis, turnis min kaj kuntrenis min post si. Tiam mi memoris pri la piedo kaj la vundo, kaj ekklamis; sed ili diris: “Ho, nun vi lamas, kaptite ĉe la forkuro! Tamen, kiam vi ankoraŭ kredis eskapi, vi plene sanis, pli rapida ol ĉevalo, flugilhava eĉ.” Tiujn ĉi vortojn sekvis la bastono, kaj jam mi havis vundon je la femuro pro iliaj admonoj. Kiam ni reatingis la hejmon, la maljunulinon ni trafis pendanta je ŝnuro de la roko; ŝajne timante, kiel ŝi ja povus, la mastrojn pro la eskapo de la knabino, ŝi ligis la ŝnuron al si ĉirkaŭ la kolon kaj sin pendumis. Ili admiris la ĝustan juĝon de l' maljunulino, malligis ŝin kaj kun la ŝnuro ankoraŭ ĉirkaŭ la kolo deĵetis ŝin en la abismon, sed la knabinon ili ligis endome, poste ili manĝis, kaj la trinkado estis longa.

25. Intertempe ili parolis pri la knabino: “Kion ni faru kun la forkurintino?”, unu el ili demandis. “Kion alian”, diris alia: “ol ĵeti ŝin malsupren al la maljunulino? Kiom dependas de ŝi, ŝi ja senigis nin de multa mono! La tutan bandon ŝi perfidis! Vi ja bone konsciu, amikoj, ke

se ŝi la domon estus atinginta, neniu el ni plu restus viva; ni ĉiuj estus kaptitaj, se niaj malamikoj farus komunan atakon. Tial ni venĝu nin je la malamikino; sed ŝi ne mortu tiel facile, faligite sur la rokon, sed por ŝi ni eltrovu la plej dolorigan kaj plej longdaŭran morton, kiu teninte ŝin longtempe en torturado nur finfine mortigas ŝin.”

Tiam ili pridiskutis ŝian morton, kaj unu diris: “Mi scias, ke mian majstraĵon vi akceptos! La azenon ni devas mortigi, ĉar ĝi estas sentaŭgulo, kaj ĝi nun eĉ ŝajnigas sin lama, kaj ĉefe ĉar ĝi helpis kaj ebligis la fuĝon de la knabino; matene ni do buĉu ĝin, tratanĉu ĝian ventron, ĉiujn intestojn ni elmetu eksteren, kaj ĉi bonan knabinon ni loĝigu en la azeno, kun la kapo elstara el la azeno, por ke ŝi ne tuj sufokiĝu, sed la cetera korpo plene kaŝiĝu ene, por ke, kiam ŝi enestas, ni ambaŭ bone kunkudru por ĵeti eksteren por la vulturoj — tute nove preparita manĝaĵo! Amikoj, konsideru, kia terura torturo: unue enloĝi azenan kadavron, krom tio kuirigi en tiu bestaĉo pro la suno somertempe plej varma, kaj formorti pro malsato ade malviviga, eĉ ne havante la eblon sufoki sin mem! Kion cetere ŝi suferos, kiam la azeno ekputros, malpura pro la fi-odoro kaj la vermoj — tion mi ne mencios. Fine la vulturoj penetros tra la azenon kaj disŝiros ŝin samkiel ĝin, eble eĉ ankoraŭ dumvive.”

26. Ĉiuj laŭte ekhurais kvazaŭ pro bonega grandioze mirinda ideo. Sed mi prilamentis mian sorton, ĉar mi estos buĉita kaj eĉ mia kadavro ne kuŝos sendifekta, sed la kompatindan knabinon ĝi akceptos kaj estos la tombo de tiu junulino, kiu misfaris nenion.

Sed ankoraŭ estis matenkrepusko kaj subite jen aperis amaso da soldatoj por ataki ĉi fiulojn, kaj en momenteto ĉiujn ili ligis kaj forportis ilin al la guberniestro de la regiono. Hazarde estis alveninta la fianĉo de la knabino kun la soldatoj; fakte estis li, kiu montris la restadejon de la rabistoj. Li do akceptis la knabinon kaj sidigis ŝin sur min por hejmen konduki ŝin. La vilaĝanoj, kiam ili nin vidis defore, konsciis ke ni estas en ordo, ĉar mi antaŭblekis al ili la bonan novaĵon, kaj ili alhastis, kisis kaj enakompanis nin. **27.** La knabino estis tre konsiderema al mi, ĉar mi estis ŝia kunkaptito, kunfuĝinto kaj kunriskinto de la sama morto kiel ŝi. Kaj kiel matenmanĝon mi ricevis nome de mia mastrino buŝelon da hordeo kaj pajlon en amaso sufiĉa por kamelo. Kaj precipe tiam mi sakris

Palestran, ke per sia arto ŝi ŝanĝis min en azenon kaj ne en hundon; ĉar mi vidis la hundojn enŝteliĝi en la kuirejon kaj forgluti la multajn frandaĵojn konvenajn al riĉa geedziĝo. Kelkajn tagojn post la nupto, kiam mia mastrino eldiris sian dankon al mi antaŭ la patro, ankaŭ li deziris kompensi min laŭmerite kaj li ordonis, ke mi estu liberigita por paŝtiĝi subĉiele inter la ĉevalinaro; “Ĉar”, li diris: “ĝi vivos kiel libera en plena ĝuo, kaj povos sursalti la ĉevalinojn.” Kaj vere, tiam ĝi ŝajnis la plej justa rekompenco, se envere devus ĝin prijuĝi iu azeno. Do li vokis unu el la ĉevalgardistoj, transdonis min al li, kaj mi ĝojis ĉar neniam mi plu bezonos porti ŝarĝojn. Kiam la kampon ni atingis, la gardisto min metis inter la ĉevalinoj kaj kondukis nian tutan gregon al la paŝtejo.

28. Sed estis fatale, ke ankaŭ tiam okazu al mi kiel al Kandaŭlo*; ĉar la gardisto lasis min hejme por lia edzino Megapola*, kaj tiu al la muelilo min jungis, por ke mi muelu por ŝi la tritikon kaj la hordegrajnojn, kaj tio ĉi estus malgranda peno por dankema azeno, mueli por siaj propraj gemastroj; sed ĉi plejbelulino ludonis mian kompatindan kolon ankaŭ al la ceteraj en tiuj kamparoj (kaj estis multege da ili!), postulante delikatan farunon kiel pagon, kaj la hordeon de mia matenmanĝo ŝi rostis kaj igis min mueli ĝin, por fari el ĝi kukojn kiujn ŝi voris; kaj por mi restis la brano matenmanĝe. Kaj kiam la gardisto kunprenis min kun la ĉevalinoj, mi pereis pro la interbatiĝoj kaj mordoj de la virĉevaloj; ĉar ade ili min supozis adultulo kun iliaj inoj, persekutadis min frapante ambaŭhufe, tiel ke la ĉevalan ĵaluzon mi ne kapablis elteni. Magra do kaj malbela mi fariĝis en ne multe da tempo, ĉar mi nek ĝuis ene ĉe la muelilo nek subĉiele, atakate de la sampaŝtejoj.

29. Krome mi estis ofte sendata sur la monton por transporti lignon sur la ŝultroj. Tio estis la kulmino de miaj suferoj; ĉar unue necesis surgrimpi altan monton, terure krutan vojon, krome sen hufferoj, sur monto ŝtonoza. Kaj ili kunsendis azenpeliston, fian knabon. Tio* ĉiam denove sciis pereigi min; unue li batis min eĉ kiam mi kuris rapide, ne per ordinara bastono, sed per iu kun multaj kaj pikaj nodoj, kaj ĉiam li batis la femuron samloke, tiel ke mia femuro pro lia bastono havis nudan vundon tiuloke; ĉiam li batis la vundon. Krome li surmetis ŝarĝon, kian eĉ elefanto apenaŭ povus subteni; kaj desupre la descendo estis abrupta; sed ankaŭ tiam li min batis. Kiam mian ŝarĝon li vidis forgliti aŭ renversiĝi

unuflanken, li ja devus forpreni el la ligno por meti ĝin je la loko malpli peza por egaligi, sed tion li absolute ne faris: grandajn ŝtonojn el la monto li levis sur la malpli pezan flankon, kiu suprenŝoviĝis; kaj mi kompatinda descendis portante senutilajn ŝtonojn kune kun la ligno. Estis eterna* rivero sur nia irejo; por ŝpari la ŝuojn, li transiris la riveron sidante malantaŭ la ligno, sur mia dorso.

30. Se foje mi falis, pro laceco sub la peza ŝarĝo, tiam mia mizero iĝis netolerebla; [*] ĉar kie estus okazo por etendi al mi la manon, kaj levi min de la grundo, forpreni iom el mia ŝarĝo, li neniel volis etendi la manon, sed desupre komencante, de la kapo kaj la ŝultroj, li batis min per la bastono, ĝis liaj batoj igis min stariĝi. Krome li ludis alian teruraĵon netolereblan je mi: kuniginte ŝarĝon da plej pikaj dornaĵoj kaj ŝnure densiginte kiel pendaĵon malantaŭe ĉe mia vosto, — kiam mi ekiris la vojon, kiel vi komprenos ili tie pendante min pikis kaj vundis*; kaj defendi min estis neeble, ĉar la vundiloj min ade sekvis kaj dependis dee de mi. Ĉar se mi malrapidege antaŭeniris atentante la frapadon de l' dornaĵoj, mi pereis sub lia bastonado, kaj se la bastonon mi fuĝis, tiam la teruro min akre trafis demalantaŭe. Entute estis la laboro de mia azenisto pereigi min.

31. Kiam unu tagon mi ne plu povis toleri la multajn teruraĵojn, mi piedbatis lin, kaj tiun piedbaton li ĉiam tenis memore. Foje li ordoniĝis transporti linon de unu loko al alia; li prenis min, kolektis multan linon, ligis ĝin sur min kaj bone streĉe ligis ĝin ekstre ĝene por mi, kuirante per ĉi ŝarĝo grandan penon al mi. Kiam ni devis foriri, el la fajrejo li ŝtelis ŝtipon ankoraŭ brulan, kaj kiam ni distanciĝis de la farmbieno, la ŝtipon li kaŝis en la linon. Ĝi —kion alian ĝi povus fari?— tuj ekbrulis, kaj tuj mi portis nenion alian ol grandegan fajron. Komprenante, ke baldaŭ mi estos rostita, mi ĵetis min —ĉar hazarde laŭ la vojo estis profunda marĉo— en la plej akvan parton de la marĉo; tie mi rulis la linon do, turniĝante kaj rondiĝante, kaj per la koto mi estingis tiun varmegan kaj ĝenan al mi ŝarĝon, kaj tiel malpli riske mi daŭrigis la ceteran vojaĝon. La knabo ne plu povis bruligi min, ĉar la lino pro la koto malsekiĝis. Kaj la impertinenta knabo post ĉi vojaĝo mensogis pri mi, ke plenintence mi preterpase puŝiĝis kontraŭ la fajrejo. Tiel tiufoje mi eskapis la linon, ne plu supozante. **32.** Sed la fia knabo eltrovis por mi ion alian ankoraŭ

multe pli teruran: li kunprenis min al la monto kaj riĉan ŝarĝon da ligno li surmetis, — tiun li vendis al apude loĝanta farmisto, sed min mem li nuda kaj senligna hejmenkondukis, kaj mensogis tiam malpian aferon pri mi al la mastro: “Mastro, tiun azenon mi ne scias kial ni manĝigu ankoraŭ, ĉar ĝi estas nenifara kaj lanta. Kaj ĵuse ĝi ekkutimas ion novan: tuj kiam belan junulinon aŭ knabon ĝi rimarkas, ĝi piedbatas min for kaj kure postsekvas ilin, kvazaŭ viro enamiĝinta, kiu sin direktas al la amata virino, kaj ĝi mordas, ŝajnigante kisi, kaj ĝi devigas ilin sekskuniĝi, kaj tiel ĝi kaŭzos al vi procesojn kaj problemojn, ĉar ĉiujn ĝi insultas kaj ĉiujn renversas. Ĵus nun, lignon portante, virinon ĝi vidis foriri en la kamparon, kaj ĉiun lignaĵon ĝi ĵetis teren tute dise, la virinon sur la plankon faliginte ĝi volis fiki, ĝis homoj de ĉiuj direktoj alkuris kaj protektis la virinon, ke ŝi ne disŝiriĝu de tiu bela amanto.”

33. Kiam la alia tion ĉi sciiĝis, li diris: “Nu, se ĝi ne deziras iri kaj transporti, kaj hom-amorojn amas, volupta je virinoj kaj knaboj, buĉu ĝin do, donu la intestojn al la hundoj, sed la viandon gardu por la laboristoj; kaj se estos demandate, kiel ĝi pereis, kulpigu pri tio iun lupon.”

La fia knabo, mia azenisto, ĝojis kaj tuj volis buĉi min. Sed hazarde ĉeestis unu el la najbaraj farmistoj; tiu savis min de la morto per terura plano pri mi.

“Neniĉiel”, li diris: “ne mortigu azenon, se ĝi ankoraŭ kapablas mueli kaj portaĉi; ja ne malfacilas, ĉar ĝia volupta amo direktiĝas al homoj, prenu ĝin kaj kastru! Senigite de tiu romantika emo, ĝi baldaŭ fariĝos malsovaĝa kaj dika, kaj sen ajna plendo portos grandajn ŝarĝojn. Se persone vi estas sensperta en tiu ĥirurgio, post tri aŭ kvar tagoj mi venos kaj per mia tranĉo mi faros tiun ĉi pli kvieta ol ŝafideto.”

Ĉiuj en la domo jesis la proponon, ke li bone sugestas, sed mi jam larmis, ĉar baldaŭ mi perdos la virecon en ĉi azeno kaj mi decidis ne plu deziri vivi, se mi fariĝos eŭnuĥo; mi decidis tial de tiam plene malsatmorti aŭ ĵeti min de la monto, kie, falinte al morto plej mizera, mi almenaŭ mortos plenmembra kaj senmutila.

34. Dum nun estis nokto profunda, mesaĝisto venis el la vilaĝo en la kamparon kaj la biendomon, dirante pri la ĵusnuptita junulino kiu estis la kaptitino de l’ rabistoj kaj pri ŝia fianĉo, kiel treege malfruvespere ambaŭ promenis laŭ la marbordo, kaj la maro subite ŝveliĝis kaj forkaptis ilin,

malaperigis ilin, kaj tio do estis ilia tragika fino. Ĉar la domo do estis senigita de la junaj gemastroj, ili decidis ne plu resti en sklaveco, sed ĉion ene ili rabis kaj per fuĝo sin forsavis. La ĉevalzorgisto prenis ankaŭ min, kaj kaptinte kion li povis, ĉion li surligis sur min kaj la ĉevalinojn kaj la ceterajn bestojn. Kvankam min ĝenis porti la ŝarĝon de vera azeno, tamen ĝoje mi akceptis tiun ĉi malebligon de kastrigo. La tutan nokton ni iris vojon malfacilan kaj post tri tagoj da plua vojaĝado ni atingis Berojan, grandan kaj multthoman urbon en Macedonio.

35. Tie niaj pelintoj decidis ekloĝi. Kaj tiam estis disvendiĝo de ni bestoj. Heroldo meze de la vendoplaco starante anoncis ĝin klare. La alproksimiĝantoj deziris malfermi kaj inspekti niajn buŝojn, kaj vidis ĉies aĝojn je la dentoj, kaj unu post la alia ili aĉetis, sed kiam mi kiel lasta estis postlasita, la heroldo ordonis rekonduki min hejmen. “Vi vidas”, li diris: “sole tiu ĉi ne trovis mastron.” Sed Nemeza, kiu ĉiam tiom implikas kaj intermiksas, ankaŭ por mi sciis trovi mastron — kvankam ne kian mi deziris. Estis ja maljuna kinedo*, — unu el tiuj, kiuj la Sirian diinon* kondukas laŭ vilaĝoj kaj kamparoj por igi la diinon almozpetadi. Al tiu ĉi mi estis vendita je la ega prezo de tridek draĥmoj*; suspirante mi sekvis mian mastron.

36. Kiam ni alvenis, kie loĝis Filebo* — ĉar tiun nomon havis mia aĉetinto — li laŭte kriis antaŭ la pordo: “Knabinoj, sklavon mi aĉetis por vi, belan kaj virecan kaj kapadocian* laŭdevene.”

Ĉi tiuj knabinoj estis aro da kinedoj samprofesiaj kiel Filebo, kaj je lia voko ĉiuj aplaudis; ili ja kredis, ke la aĉetito vere estas viro. Sed kiam ili vidis, ke la sklavo estas azeno, jen ili ŝercis al Filebo: “Tio ne estas sklavo, sed fianĉo por vi mem: kie vi lin trovis? Ĝuu de tiu bela nupto* kaj baldaŭ generu idojn similajn por ni.”

37. Kaj ili ridis. Sed la sekvan tagon ili prepariĝis por la laboro, kiel ili tion nomis: ili vestis la diinon kaj metis ŝin sur min. Kaj tiam ni forrajdis el la urbo kaj ĉirkaŭiris la regionon. Kiam ni eniris vilaĝon, mi, la diinportanto, ekhaltis, la flutistaro entuziasme blovis, kaj la ceteraj deŝirante la mitrojn*, kurbigante la kapojn ekde la nuko kaj turnante tiujn, per la glavoj tranĉis al si en la brakojn, kaj eligante la langon elinter la dentoj, ĉiu el ili tranĉis ankaŭ ĝin — tiel ke en momenteto ĉio pleniĝis je sango de la molaĉuloj. Tion vidante, komence mi restis treme stari,

timante ke la diino same sentus bezonon je azena sango. Sed ĉiam kiam ili tiel sin tranĉis, ili kolektis obolojn kaj draĥmojn de la ĉirkaŭaj spektantoj; aliaj donacis sekigitajn figojn kaj kruĉon da vino, fromaĝojn kaj buŝelojn da tritiko kaj hordeon por la azeno. El tio ĉi, ili sin nutris, servante la diinon, kiu vojaĝis miadorse.

38. Foje, kiam vilaĝon tiean ni invadis, ili ĉaskaptis fortikan knabon de l' vilaĝo kaj kondukis lin tien, kie ili havis tranoktejon. Tiam ili ricevis de la vilaĝano tion, kio estis kutima kaj agrabla al ĉi fiaj kinedoj.* Mi ekstermezure ĉagreniĝis pro mia ŝanĝiĝo kaj mi volis ekkrii: “Ho Zeŭso kruela! Ja ĝis tiom mi toleras da malbono!” — sed ne eliris mia voĉo, sed azena el mia gorĝo, kaj laŭtege mi iais. Kelkaj vilaĝanoj hazarde estis perdintaj azenon, kaj serĉante la perditan kaj aŭdante mian laŭtan krion, ili enpaŝis sen ajna vorto al kiu ajn, supozante ke mi estas ilia — kaj jen freŝafare ili trafis la kinedojn farantaj la nedirotaĵon; ekestis inter la envenintoj granda ridado. Eksteren kurante ili rakontis tra la tuta vilaĝo pri la senmoreco de la pastroj. Tiuj, tamen, ege hontis ĉar tio diskoniĝis kaj la saman nokton ili tuj foriris de tie, kaj kiam ni atingis solecan lokon dumvoje, ili ekkoleris kaj sakris al mi, ĉar iliajn misterojn mi diskonigis. Tiu ĉi ilia teroro estis tolerebla, sakriĝi, sed kio sekvis ne plu estis tolerebla; ĉar la diinon ili deprenis de mi, metis sur la plankon, kaj la tutan jungilaron forpreninte ili min ligis nuda al granda arbo, post tio ili min preskaŭ mortigis frapante min per tiu* vipo nodoza, ordonante, ke estonte mi estu tute silenta diinportanto. Fakte post la vipado ili intencis buĉi min, ĉar mi kaŭzis al ili tiom da insultoj kaj igis ilin forlasi la vilaĝon antaŭ ol la laboro pretis; sed la diino tiel aĉe ilin alrigardis, starante surplanke kaj sen transportilo, ke ili min tamen ne mortigis.

39. Post la vipado, mi do ekprenis mian mastrinon kaj pluiris, kaj kiam jam vesperiĝis, ni haltis ĉe la bieno de riĉa viro. Li estis hejme kaj tre ĝoje akceptis la diinon en sian domon, kaj faris oferojn al ŝi. Tie mi scias, ke mi persone grave endanĝeriĝis: ĉar unu el la amikoj estis sendinta al la terposedanto donace femuron de sovaĝa azeno; la kuiristo ricevis ĝin por prepari ĝin, sed pro senatento ĝin perdis, kiam aro da hundoj enŝteliĝis; timante batiĝi kaj torturiĝi pro la perdo de l' femuro, li jam decidis pendigi sin je la nuko. Sed lia edzino —mia terura mizero— diris: “Ne mortigu vin mem, ho karega, nek fordonu vin al tia senespero;

obeu min kaj ĉion vi povos bone fini por mi. Prenu la azenon de la kinedoj al dezertejo, buĉu ĝin tie kaj mem fortranĉu tiun pecon —la femuron— kaj prenu ĝin tien ĉi, preparu kaj servu ĝin al via mastro, kaj la reston de la azeno vi deĵetu suben en abismon; ĝi ja aspektos esti forkurinta ien kaj malaperinta. Vi ja vidas kiel bone viandhava ĝi estas kaj ĉiurilate preferinda ol la sovaĝa.”

La kuiristo jesis la proponon de la edzino, kaj diris: “Tio estas grandioza, virino, kaj nur tiamaniere mi povos eskapi vipadon, mi tion jam jam plenumos.”

Tuj apud mi starante, la sendiulo do tiel kun sia edzino planis fariĝi mia kuiristo! **40.** Sed, antaŭvidante kio okazos, mi decidis prefere savi min de lia tranĉilo, kaj rompinte la ŝnuron, per kiu mi estis ligita, kaj eksaltinte mi engalopis tien, kie la kinedoj estis manĝantaj kun la terposedanto. Tien enkurante, mi renversis per mia saltado ĉion: lampon, tablojn; mi supozis ke mi trovis subtilan metodon por mia saviĝo, kaj ke la terposedanto tuj ordonos, ke mi kiel fame konata azeno sendanĝere estu gardata post ŝlosilo; sed ĉi subtilaĵo kondukis min en ekstreman danĝeron. Opiniante min freneza, ili streĉis jam multajn glavojn kaj lancojn kaj longajn bastonojn al mi, kaj tiel sintenis por ke ili min mortigu. Vidante kiel granda estas la danĝero, mi eniris haste tien, kie miaj mastroj estis dormontaj. Kiam tion ili vidis, ili sekurege ŝlisis la pordojn deekstere.

41. Kiam jam estis aŭroro, mi ekleviis ree la diinon kaj foriris kune kun la almozmanoj kaj ni atingis alian grandan kaj multoman vilaĝon, en kiu ili elfaris novan monstraĵon, [nome] ke la diino ne restu en domo de homo, sed ekloĝu la templon de la de ili plej honorata diino. Tre ĝoje ili bonvenigis la fremdan diinon por loĝigi ŝin ĉe ilia propra diino, kaj al ni ili disponigis domon de malriĉuloj. Kiam la mastroj tie pasigis plurajn tagojn, ili volis pluri al apuda urbo kaj repetis la diinon de la enlandanoj; do ili mem eniris la sanktejon, elportis ŝin, metis sur min kaj foriris. Kiam la sakrilegiuloj eniris la sanktejon, ili ŝtelis oran trinkpelveton, eksvoton; tiun ili forportis kaŝita sub la diino; kiam la vilaĝanoj eksciis tion, ili tuj persekutis, poste kiam ili alproksimiĝis, ili desaltis de la ĉevaloj, ekkaptis ilin mem sur la vojo, nomis ilin sendiaj kaj sanktaĵrabistoj kaj repostulis la ŝtelitan eksvoton, kaj ĉion traserĉante, ili ĝin trovis en la sino de la

diino. Ili kondukis la ineculojn ligitaj returne kaj metis ilin en la malliberejon, sed la diinon kiu veturis sur mi, ili prenis kaj donacis al alia templo, kaj la oraĵon ili redonis al la urba diino.

42. La sekvan tagon ili decidis vendi ĉiujn [iliajn] posedaĵojn kaj min mem, kaj aĉetis min fremdulo loĝanta en najbara vilaĝo, kies metio estis baki panojn; li min prenis, ŝarĝis min per dek buŝeloj da tritiko, kiujn li aĉetis, kondukis min hejmen laŭ vojo malfacila; kiam ni alvenis, li min irigis en la muelejon, kaj tie mi vidis grandan amason ene da kunservaj bestoj, kaj estis multaj mueliloj, kaj ĉiujn turnis [la bestoj], kaj ĉio estis plena je et-era tritikfaruno. Kaj tiam ili min lasis tie, ĉar mi estis nova sklavo kiu ĵus transportis pezegan ŝarĝon laŭ vojo malfacila — ke mi iom refreŝiĝu, sed la sekvan tagon ili blindigis al mi la okulojn, ligis min sub la trabon de la muelilo, kaj poste min ekpelis. Kvankam pro longa kutimo mi sciis, kiamaniere mueli, mi ŝajnis nescion; sed mia espero estis vana. Multaj de l' endomaj uloj prenis bastonojn, stariĝis ĉirkaŭ mi kaj kiam mi ĝin ne atendis, ĉar mi nenion vidis, per samtempaj brakoj ili min bategis, tiel ke mi komencis subite turniĝi kiel turbo pro iliaj frapegoj; kaj pruve mi konvinkiĝis, ke sklavo devas fari sian taskon kaj ne atendi la manon de la mastro.

43. Do mi fariĝis maldika kaj malforta laŭkorpe, tiel ke la mastro decidis vendi min, kaj aĉetis min viro, ĝardenisto laŭokupe: tiu ja havis ĝardenon por kultivi. Ni havis jenan laboron: je mateniĝo mia mastro surmetis la legomojn sur min, portis ilin al la vendoplaco, kaj liverinte ilin al la vendistoj, kondukis min ree al la ĝardeno. Tiam do li fosis kaj plantis kaj akvumis la kreskaĵojn, dum mi tie staris nenifare. Tamen tiu vivo al mi estis tre laciga, unue ĉar nun estis vintro kaj li eĉ por si mem ne povis pagi kovrilon, des malpli por mi, kaj nudpiede mi surpaŝis malsekan argilon kaj duran, akran glacieron — kaj por manĝi ni ambaŭ havis nur amaran kaj malmolan laktukon.

44. Kiam foje ni eliris al la ĝardeno, ni renkontis viron fortikstaturan en militista uniformo, kiu komence alparolis nin latine* kaj demandis la ĝardeniston, kien min —la azenon— li kondukas; sed tiu, miasupoze ĉar la lingvon li ne komprenis, respondis nenion; la alia tamen, kolera pro la supozata insulto, batis la ĝardeniston per sia vipo, sed tiu ĉi interplektiĝis kun li, piedkapte faligis kaj surgrunde elstreĉis lin, kaj la kuŝanton li

bategis per mano kaj piedo kaj ŝtono el la strato; la alia unue kontraŭstaris kaj minacis, se fine li surpiediĝos, glave mortigi lin; sed la unua, instruite de la alia, elektis la plejsekuraĵon, ĵetis lian glavon longe for, kaj post tio refoje ekbategis la kuŝanton. Vidante ke ĉi mizero nun estas neeltenebla, tiu ŝajnis sin mortinta sub la batoj; la alia, timigite pro tio ĉi, postlasis lin tie, kia li estis, sur la grundo, sed la glavon li donis al mi por porti al la urbo.

45. Kiam ni tie alvenis, li konfidis sian ĝardenon kulturi al kolego, kaj li mem timante la danĝeron pro ĉi tiu vojaĝo kaŝiĝis kune kun mi ĉe unu el siaj amikoj en la urbo. La sekvan tagon, estas plene ilia merito, ili tiel agis: mian mastron ili kaŝis en kesto, min mem ili prenis je la piedoj kaj igis ŝtupare supren al supera ĉambreto, kaj tie ili min enŝlosis. La militisto finfine pene stariĝis de la vojo, — laŭ ilia diraĵo, ŝanceliĝante pro la batoj atingis la urbon, trafis siajn kunsoldatojn, kaj rakontis al ili la frenezaĵon de la ĝardenisto; sekve ili lin akompanis, eksciis, kie ni nin kaŝas, kaj alvokis la urbajn magistratanojn. Tiuj ensendis unu el siaj servistoj kaj ordonis, ke ĉiuj en la domo eliru; kiam tiuj aperis, la ĝardenisto nenie plu estis trovebla. Tial la soldatoj diris, ke la ĝardenisto estas ene kaj ankaŭ mi, lia azeno; la aliaj tamen diradis, ke nenio plu restis ene, nek homo nek azeno. Kiam el tio estiĝis bruo en la strateto kaj multa kriado, mi la honorinda kaj ĉion-sciema, dezirante sciiĝi, kiuj estas la kriantoj, trametis la kapon desupre suben tra la fenestro. Ili min vidis kaj tuj ekkriis; pri la aliaj pruviĝis, ke ili mensogis; kaj la magistratanoj eniris, traserĉis ĉion kaj trovis mian mastron en la kesto, ili kondukis lin en la malliberejon por atendi la proceson pro sia trokuraĝo, kaj min ili malsupren kondukis kaj transdonis al la militistoj. Ĉiuj ili ridegis nehaltigeble pro la perfidulo el la supra etaĝo kiu malkaŝis sian propran mastron; kaj de tiam, origininte de mi disvastiĝis inter la homoj la proverbo “El azena kaŝobservado”.*

46. La sekvan tagon, kion suferis la ĝardenisto, mia mastro, mi ne scias, sed la soldato decidis vendi min, kaj li min vendis por dudek kvin atikaj [draĥmoj]; la aĉetinto estis servisto de viro tre riĉa el la plej granda urbo de Macedonio, Tesaloniko. Tiu havis kiel okupon, pretigi la viandaĵojn por sia mastro, kaj fraton kunservon li havis, kiu sciis baki panojn kaj prepari bonguste mielkukojn. Tiuj fratoj ĉiam estis kunuloj,

loĝis samloke, kaj tenis la ilojn de siaj profesioj kune, kaj pliposte ili loĝigis ankaŭ min, kie ili mem loĝis. Post la vespermanĝo de la mastro, ambaŭ enportis multajn restaĵojn, unu viandaĵojn kaj fiŝaĵojn, la alia panojn kaj platajn kukaĵojn. Ili enŝlosis min kun tio ĉi, konfidis ĉi dolĉan gardotaĵon al mi, kaj foriris bani; kaj longan ‘saluton’ dirante al la ĉekuŝanta hordeo, mi dediĉis min al la artaj produktoj de miaj mastroj, kaj depost longe mi fine denove plenigis min per homa manĝaĵo. Returniĝante unue ili nenion rimarkis pri mia frandado el la superabundo da prete kuŝantaj aĵoj, ankaŭ ĉar mi mian manĝon ŝtelis tre singarde kaj kaŝeme. Sed kiam fine mi decidiĝis pri ilia plena nekoscio, mi formanĝis la plej belajn el la porcioj kaj krom tio multegajn, kaj kiam ili rimarkis tiun perdon, komence ili rigardis suspekteme reciproke kaj unu nomis la alian ŝtelisto kaj rabisto de l’ komunaj kaj senhontulo, kaj poste ambaŭ estis tre akurataj kaj ekkutimiĝis nombrado de la frandaĵoj. **47.** Sed mi vivis plezure kaj lukse, kaj mia korpo pro ĉi konata manĝaĵo denove fariĝis bela kaj la haŭto briletis, ĉar la hararo abunde ekkreskis. Kiam ĉi tiuj bonuloj vidis min granda kaj dika, dum la hordeo ne elĉerpiĝis, sed restis en la sama kvanto, ili komencis suspekti miajn sentimaĵojn, kaj ŝajnigante sin foriri al la banejo, ili ŝlosis la pordojn post si, metis la okulojn antaŭ iu truon de la pordo kaj rigardis enen. Kaj mi, nenion tiutempe sciante pri ilia ruzo, mi komencis mian matenmanĝon. Unue ili ridegis vidante tiun nekredoblan manĝon; poste la kunsklavojn ili alvokis por rigardi min; kaj estis multa ridado, tiel ke ankaŭ la mastro aŭdis la ridadon, kvankam la bruo estis ekstere, kaj li demandis, kio estas, pri kio ili ekstere ridas. Kiam li ĝin aŭdis, li ekstaris de la trinkado* kaj ekstereniris, trarigardis enen, vidis min formanĝi pecon de sovaĝa porko, kaj eksplodante en laŭta ridado enrapidis enen. Mi tre ĉagreniĝis ĉar mia mastro vidis min ŝtelisto kaj frandulo samtempe. Sed li multege ridis pri mi, kaj unue ordonis enkonduki min en lian manĝoĉambro, poste li diris ke tablon oni metu ĉe mi kaj ke estu sur ĝi ĉio ajn kion alia azeno ne povas manĝi, viando, krustacoj, supoj, fiŝoj: tio ĉi kuŝanta en saŭco aŭ oleo, aliaj surverŝitaj de mustardo. Kaj mi, vidante ke la feliĉo min dolĉe alridas kaj komprenante ke nur tiu ĉi ŝercas min savos, kvankam mi jam estis plenmanĝinta, tamen starante ĉetable mi ĝuis la manĝon. La manĝoĉambro reeĥis je ridado. Kaj iu diris: “Tiu azeno ankaŭ trinkos

vinon, se oni ĝin miksitaj* al ĝi proponos”; kaj la mastro ordonis kaj mi trinkis la proponitaĵon.

48. Kiel kompreneblas, li vidis ke mi estas mirinda posedaĵo, kaj al unu el siaj intendantoj li ordonis repagi mian prezon al miaj aĉetintoj kaj la samon ankoraŭfoje, sed min li konfidis al unu el siaj propraj liberigitaj* kaj diris ke li instruu min en ĉio ajn, per kio mi povus amuzi lin plej bone. Ĉio ĉi estis ege facila por li; mi ja tuj obeis al ĉio, kiam mi estis instruata. Unue li igis min ekkuŝi sur liton samkiel viro, sur la kubuto, poste lukti kun li kaj eĉ ja danci starante sur du kruroj, kaj kapskui ‘jes’ kaj ‘ne’ laŭ la voĉoj, kaj ĉion alian kion mi jam povis fari eĉ sen instruiĝi; kaj tio estis la afero priparolata, la azeno de la mastro, vintrinkanto, luktanto, azeno dancanta. Sed la ĉefaĵo estis ke laŭ la voĉoj mi sciis kapskui ‘jes’ kaj ‘ne’ ĝustamomente; kaj tuj kiam mi deziris trinki, mi puŝis la vinverŝiston kaj okule demandis. Kaj ĉiuj estis mirigitaj pri la nekomprenebla afero, nesciante ke homo kaŝiĝas en la azeno; sed ilian nescion mi eluzis por mia lukso. Kaj mi eĉ lernis marŝi kaj porti mian mastron sur mia dorso* kaj kuri rapidpaŝe sen ĝeno kaj apenaŭ rimarkeble por la sursidanto. Kaj mi havis jungilaron multekostan, kaj purpurajn tukaĵojn oni surmetis sur min, kaj mi ricevis enbuŝaĵon faritan el arĝento kaj oro, kaj tintiloj estis pendantaj je mi sonantaj laŭ plej muzeca melodio.

49. Nia mastro Meneklo, kiel mi jam diris, estis veninta tien ĉi el Tesaloniko, pro ĉi tio: li promesis doni al sia patrurobo gladiatoran spektaklon; kaj la bataluloj jam estis trejnantaj sin, kaj alvenis la tempo foriri. Do je tagiĝo ni foriris, kaj mi portis la mastron kie ajn malglatis la vojo kaj malfacilis por la ĉaroj por pasi. Kiam Tesalonikon ni atingis, ne estis homoj, kiuj ne amasiĝis por la spektaklo kaj por vidi min; ĉar mia famo longe antaŭiris nin; pri mia multroleco kaj la homsimileco de miaj dancoj kaj luktadoj. Sed mia mastro min montris ĉe la trinkado nur al siaj plej distingitaj kuncivitanoj kaj li demonstris mian nekredeblajn ŝercojn ĉe la vespermanĝo.

50. Mia ĉefo trovis el mi enspezon de multaj draĥmoj; ĉar li enŝlosis min ene, lasis min tie stari, kaj por ĉiuj, kiuj deziris vidi min kaj miajn nekredeblajn farojn, li malfermis la pordon kontraŭ pago. Ili enkonportis ĉiu ion alian por manĝi, precipe aĵojn, kiujn oni juĝis malamikaj al azena

stomako; kaj mi manĝis. En kelkaj tagoj, kunmanĝante kun mia mastro kaj kun la enurbaj homoj mi jam fariĝis granda kaj ege grasa.

Foje fremda virino kaj ne malmulte riĉa, bela por vidi, aperis por vidi min manĝi kaj varme enamiĝis je mi, parte ĉar ŝi vidis la belecon de l' azeno, parte ĉar pro la nekredebleco de miaj faroj ŝi venis en sopiron je sekskuniĝo; kaj ŝi parolis al mia ĉefo kaj promesis al li abundan sumon, se li permesus al ŝi trapasi la nokton kun mi; kaj ĉar li neniom pripensis, ĉu ŝi plenumos ion je mi aŭ ne, li akceptis la sumon.

51. Kaj kiam jam estis nokto kaj la mastro forsendis nin el la manĝoĉambro, ni returniĝis al nia dormloko, kaj la virinon ni trovis jam alveninta en mia lito. Por ŝi estis pretigitaj kusenoj molaj kaj kovriroj estis ene dismetitaj kaj estis preta por ni dormloko plej inda surplanke. La servistoj de la virino sekve ekdormis tute apude antaŭ la ĉambro, kaj ŝi mem bruligis lampon grandan brilan je fajro; tiam ŝi senvestiĝis, staris tute nuda ĉe la lampo, kaj elverŝis parfumon el alabastra ujo, kaj sin ŝmiris per ĝi, kaj ankaŭ min ŝi priŝmiris el ĝi, precipe mian nazon ŝi plenigis per la parfumo, poste min ŝi kisis kaj alparolis min kvazaŭ mi estus ŝia amato kaj homo, kaj je la kolbrido preninte min, ŝi min tiris sur la kuŝejon; kaj mi neniel bezonis instigilon ĉe tio, mi estis iom ebria pro la multa olda vino, pro la ŝmiro de l' parfumo iom ekscitita, kaj vidante la junulinon ĉiel bela mi kuŝiĝis, kaj ege turmentiĝis, kiamaniere mi suriru la hominon; ĉar depost azeno mi fariĝis, mi ne plu sekskuniĝis eĉ ne je normala azena maniero kaj ne amoris al azenino; precipe tio min ege timigis, ke la virino ne disŝiriĝu, se ŝi min enprenus, kaj ke mi ne rajte estu punata kiel hommortiginto. Mi ne sciis ke mi timas senkiale. Ĉar la virino invitis min per multaj kisoj, kaj ja pasiaj!; kaj kiam ŝi vidis ke mi ne plu povas reteni min, ŝi kuŝis apud mi kvazaŭ ĉe viro, ĉirkaŭbrakis min, enigis kaj akceptis ĝin tutlonge enen. Kaj mi malkuraĝulo ankoraŭ timis kaj lante min ŝovis malantaŭen, sed ŝi tenis miajn koksojn, por ke mi ne foriĝu, kaj mem ŝi sekvis, se ĝi forglitis. Kiam mi senerare konvinkiĝis, ke mi devas ion kroman fari por la plezuro kaj ĝuo de la virino, sentime mi poste ŝin servis, kvazaŭ mi estus neniom pli fia ol la adultulo de Pasifaa*. La virino estis tiel preta por amorado kaj tiel nesatigebla je la sekskuniĝa plezuro, ke la tutan nokton ŝi konsumis kun mi.

52. Je tagiĝo ŝi ekstaris kaj foriris, aranĝante kun mia ĉefo ke por la samo ŝi pagos la saman prezon de la nokto. Ĉar li per miaj aferoj intencis pliriĉiĝi kaj samtempe montri al la mastro mian novan [arton], li min enŝlosis kun la virino; ŝi eluzis min terure. Foje mia ĉefo iris rakonti al la mastro pri la afero, kvazaŭ li ĵus sciiĝis ĝin mem, kaj sen mia scio kondukis lin vespere jam tien, kie ni dormis, kaj tra iu truo en la pordo li montris, kiel mi ene kuŝas kun la junulino. Ravita pri la vidaĵo, li deziris montri min publike tion faranta, kaj ordonis nenion diri pri tio ĉi. “Por ke”, li diris: “en la tago de la spektaklo ni enkonduku tiun ĉi en la teatron kun unu el la mortkondamnitaj virinoj, kaj li sub ĉies okuloj suriros la virinon.”

Kaj unu el la virinoj, kiu estis kondamnita morti per la bestioj, ili kondukis enen al mi kaj ordonis ŝin karesi min kaj sekskuniĝi kun mi.

53. Poste finfine kiam alvenis la tago, en kiu mia mastro montru sian bonvolemom*, ili decidis konduki min en la teatron. Kaj tiel mi eniris; estis granda lito, konstruita el hindia karapaco, ene kovrita per oro; sur ĝin oni min kuŝigis kaj la virinon ili kuŝigis apud mi. Tiam ili nin tiaj metis sur iun maŝinon kaj transportis nin en la teatron kaj lokis en la mezon, kaj la homoj laŭte ekkriis kaj aplaŭdo sonis al mi el ĉiuj manoj, kaj tablo estis starigita apud ni kaj sur ĝi kuŝis multaj bongustaĵoj, kiajn ĝuantaj molaĉuloj havas ĉe vespermanĝo. Kaj staris ĉe ni kiel vinoverŝistoj belaj knaboj por servi al ni la vinon en oro. Mia ĉefo staris malantaŭ mi kaj ordonis min manĝi; sed mi ne nur hontis tiel kuŝi en la teatro, sed same timis ke iu urso aŭ leono min eble atakus. **54.** Intertempe iu pasis portante florojn, kaj inter la ceteraj floroj mi rimarkis ankaŭ petalojn de freŝaj rozoj, kaj nenion plu timante mi salte leviĝis kaj saltis de la lito; oni supozis ke mi stariĝas por danci; sed mi laŭiris unu post la alia, forplukis elinter la floroj la rozojn kaj tiujn glutis. Dum ili ankoraŭ estis mirigitaj pri mi, defalis de mi tiu besta aspekto kaj malaperis, kaj la olda azeno estis for — Lukio mem ene de mi nuda staris surloke*. Je tiu nekredbla kaj neniel atendita vidaĵo ĉiuj konsterniĝis kaj terure bruegis kaj la teatro dividiĝis en du partiojn: kelkaj opiniis ke tuj oni min forbruligu, ĉar mi okupiĝas pri terura sorĉaĵo kaj scias multforme ŝanĝiĝi; aliaj diris ke oni devas atendi kaj aŭskulti kion mi diros, kaj nur tiam juĝi pri tio. Kaj mi kuris al la estro de la provinco —li hazarde ĉeestis la

spektaĵon— kaj desube rakontis al li, ke tesalia virino, la sklavino de tesalia virino, min priŝmiris per magia ŝmiraĵo kaj en azenon min ŝanĝis, kaj mi petegis lin aresti min kaj teni kaptita, ĝis mi konvinkos lin, ke mi ne mensogas pri mia historio.

55. La provincestro diris: “Diru al ni vian nomon kaj tiun de viaj gepatroj kaj parencoj, se tiujn vi asertas havi en via familio, kaj la urbon.”

Mi respondis: “Mia patro [...] * mia [nomo] Lukio, tiu de mia frato — Gajo; kaj ambaŭ ceterajn nomojn ni havas komune*. Kaj mi estas aŭtoro de historioj* kaj aliaj verkoj, sed li estas elegia poeto kaj bona divenisto; nia patruro estas Patraĵo en Aĥajo.”

Kiam tion ĉi la provincestro aŭdis, li diris: “Filo vi estas de homoj tre karaj al mi, amikoj kiuj akceptis min en sian domon kaj per donacoj honoris min, kaj mi estas konvinkita, ke estante ilia filo vi neniel mensogas;” kaj li desaltis de la seĝo, ĉirkaŭbrakis kaj multe kisis min, kaj li kunprenis min kun si al sia propra hejmo. Intertempe ankaŭ mia frato alvenis kun mono kaj multaj aliaj aĵoj por mi, kaj la provincestro, dum ĉiuj ĝin aŭdis, publike min liberigis. Kaj irinte al la maro, ni serĉis ŝipon, kaj niajn pakaĵojn ni enmetis. **56.** Tiam mi opiniis, ke estas plej bone iri al la virino, kiu amis min kiel azenon, dirante al mi mem, ke mi efikos al ŝi pli bela nun kiam mi estas viro. Ŝi ĝoje min akceptis, ravita — miasupoze— pro ĉi nekredebla okazaĵo, kaj petegis min manĝi kaj dormi kun ŝi; mi konsentis, ĉar mi supozis meriti la ĉielan ĵaluzon, se la azeno amita fariĝinte viro alprenus ŝajngravecon kaj malestimus ŝin, kiu foje ĝin amis; kaj mi vespermanĝis kun ŝi, abunde ŝmirita per la parfumo kaj kronornamita per la plej amata rozo, kiu min ree faris viro. Kiam jam estis profunda nokto kaj tempo por dormi, mi stariĝis kaj kvazaŭ faronte egan bonvolaĵon senvestiĝis kaj staris nuda, supozante ke mi ŝin ankoraŭ pli plaĉos pro komparo je la azeno. Sed tuj kiam ŝi vidis, ke ĉion mi havas home, ŝi kraĉis sur min kaj diris: “Ĉu vi ne neniigas antaŭ mi kaj mia hejmo?! Dormu kie ajn — longe for de mi!”

Kiam mi demandis: “Kion mi do tiom pekis?”, ŝi diris: “Je di’, ne vin, sed la azenon en vi mi amis, kaj tiam kun ĝi, ne kun vi mi dormis! Kaj mi kredis, ke almenaŭ tiun grandan simbolon de azeno vi sendifekte konservis kaj kunportas kun vi; sed al mi vi venis, ŝanĝiĝinte el tia belega kaj utila besto en ajnan simion.*”

Kaj tuj ŝi vokis la servistojn kaj ordonis porti min surŝultre el la domo, kaj elĵetite, ekstere tuj antaŭ ŝia dormoĉambro, nuda, bele kronornamita kaj parfumita, la nudan grundon ĉirkaŭbrakante, mi tie ekdormis.

Je tagiĝo, nuda mi kuris al la ŝipo, kaj mi rakontis al la frato mian malbonŝancon — ĉe multa ridado. Post tio sub favora vento ni forvelis el la urbo, kaj en kelkaj tagoj mi atingis mian patruurban. Tiam mi oferis al la dioj kiuj min savis kaj dediĉis eksvoton, ĉar mi post ege longe kaj kun tiom da penado hejmen saviĝis, ne —kiel estas la diraĵo— el la hunda pugo*, sed el la scivolemo de azeno.

* * *

(Subskribo en manuskripto Γ: Mallongigo fare de Lukiano el la Metamorfozoj de Lukio)

NOTETOJ:

1. Salon dividi — t.e. kune manĝi, amikiĝi.
2. Ĉe la manĝo viroj kuŝis sur unu flanko, kubute apogiĝante; virinoj kaj infanoj sidis sur etaj seĝoj.
3. Kunalkuŝiĝi — ŝajne estis malmulte da spaco: do eble sur la sama lito.
Demandis, kien mi iros k.t.p. — Sufiĉe malafable en tiu kulturo: oni devis atendi ĝis la gasto mem ektuŝos tiujn temojn.
4. Jura defendo ne ekzistis por fremduloj.
5. La nomo Palestra en Esperanto same klare vortludas kiel en la originalo.
7. Akvo frida kaj varma. En la antikva epoko oni ne kutimis trinki vinon pura; kutime oni ĝin miksis kun akvo varma aŭ malvarma.
Komparu kun Apulejo — Metamorfozoj I.16.
10. Ŝajne la teksto koruptiĝis tie ĉi.
11. Je via dolĉa kapo k.t.p. — variacioj de ĵuroformuloj.
17. Laŭrorozo — ĉu oleandro aŭ rododendro, ne certas.
18. “Prefere kuri reen ol pereen kuri” laŭ metrika formo aspektas kiel cito el (perdita) teatraĵo.
19. Antaŭe ĉi tiu mulo estis nomita azeno!
23. Dirka — En helena mitologio, Amfiono kaj Zeto (filoj de Zeŭso) ligis Dirkan sur taŭron, kiu kuntrenu ŝin ĝismorte. Komp. Apulejo VI.27.
24. Superflua diraĵo; en Apulejo VI.29 ili kaptiĝas pro tio, ke ili sendecide staras ĉe vojkruciĝo, disputante kiun vojon elekti. Ŝajne do eta postsigno de mallongigo de l’ origina verko helena.
28. Kandaŭlo — reĝo en Lidio, kies pereon rakontas Herodoto I.8 k.s.; karakteriza esprimo estas, ke “estis fatale”, ke li pereos.
Megapola — laŭsignife “Mult -aŭ- Eg-turna”.
29. Ne miskomposto por “tiu”!
Eterna rivero — do: ne sekiĝinta dumsomere.
30. [*] signifas ke la teksto estas nepre difektita. La traduko parte baziĝas sur supoza ‘riparo’.
“Kuniginte ŝarĝon ... kiam mi ekiris k.t.p.” Tiu ĉi frazo ne bone estas konstruita. Mi intence ne ĝustigis.
35. Kinedo — helena vorto iom malafabla por samseksemulo. Laŭ mi ‘gejo’ nepre ne taŭgus, ĉar tiu esprimo certasence estas ‘batalnomo’ de sinkonsciaj samseksemuloj strebantaj por libereco;

‘samseksemulo’ tro longas kaj krome estas tro ĝenerale senprijuga, nur-konstata. La maniero, laŭ kiu la teksto prezentas ĉi tiujn kinedojn, ne estas senplie tipa por la maniero, laŭ kiu oni traktis samseksemon en la helena kulturo. Plej interese ĉi-rilate estus kompari tekstojn de Platono, Plutarĥo kaj (Pseŭdo?-)Lukiano, precipe “Amoj” de ĉi lasta, kiu provas kompari la gean kaj la gejan amojn. Krome vidu plurajn poemojn en la Antologio Palatina — speciale libron XII — *La knabama Muzo* fare de Stratono. La esprimo ‘knabinoj’ estas ŝerco, ĉar fakte temas pri knaboj inecaj. La Siria Diino — alinome Cibela, ‘patrino de la dioj’, origine el Frigio. Servis ŝin pastroj kastritaj, kiujn ofte oni misfamigis kiel voluptamajn. Kelkfoje, jam en la klasika periodo (ekz. ĉe Ovidio) oni intermiksas Cibelan kaj Izisan.

Tridek draĥmoj — vere granda sumo. Komp. ĉ. 46.

36. Filebo — nomo signifanta ‘amiko de la juneco’. Komparu kun la diinnomo ‘Heba’.

Kapadocio estis fama pro bonegaj ĉevaloj kaj ŝarĝbestoj. Tiu ĉi loko ŝajnas esti rea indiko, ke temas pri mallongigo de verko pli ampleksa: ja nenie rakontiĝas, kiel Filebo sciiĝis, ke la azeno venas el Kapadocio. Kom. Apulejo VIII.23.

Ĝuu de tiu bela nupto — teksto ne plene klara.

37. Mitroj — kapvestaĵo de frigia deveno, antaŭulo de la mitroj de la romkatolikaj (kaj aliaj) episkopoj.
38. Iom obskure vortigite: supozeble la aŭtoro celas, ke ili igis lin bugri ilin. Kial ĝuste ĉe tiu sceno eklamentas Lukio pro sia ŝanĝiteco, ne estas klare.

“... per *tiu* vipo nodoza...” — kvazaŭ temas pri vipo jam fama! Certe unu el la plej klaraj pruvoj, ke estas ĉi rakonto mallongigo de alia, pli detala. Komp. Apulejo VIII.30 en rilato al la priskribo de la vipo en VIII.27.

44. Nelerta mallongigo denove; en Apulejo IX.39 la soldato unue parolas latine, poste helene.
45. “El azena kaŝobservado” — diraĵo el teatraĵo *Pastrino* de Menandro, laŭ Zenobio uzata kiel proverba esprimo por indiki ke viro kaptiĝis pro ridinda kialo.
47. Trinkado — laŭlitere: simpozio. Pliposte la sama vorto revenas kun la senco ‘manĝoĉambro’. Tie ĉi ‘trinkado’ ŝajnis al mi preferinda, ĉar post la manĝo oni ofte kun amikoj relative longe ankoraŭ restis kune, trinkante kaj gaje interbabilante.
- Miksita — kun akvo; komp. ĉ. 7 + noto.
48. Liberigito — sklavo liberigita de sia mastro. Tia liberigo nomiĝis

emancipo. (E = el: man = mano; cip = preni). Se sklavo pro kiu ajn kaŭzo, merita montriĝis pli ol ordinare, foje okazis ke la mastro tian sklavon deklaris libera homo. Kutime restis poste forta ligiteco socia inter ambaŭ: la eksmastro nomiĝis patrono, la ekssklavo kliento; reciproke ili sin subtenis, unu ekz. per mono, la alia per politika subteno (ĉe varbado de voĉoj balotaj k.s.).

Refoja nelertaĵo en la redakto, ĉu?

51. Pasifaa, kiu amorinte kun virbovo naskis la Minotaŭron. Ĉe ŝia entrepreno helpis la fakto, ke Dedalo estis konstruinta por ŝi bovinon el ligno, en kiun ŝi eniĝu, por ke la virbovo kredu, ke ĝi suriras veran bovinon. Ŝia edzo, Minoos, reĝo de Kreto, por kaŝi la hontindan dunaturan bebon, igis Dedalon konstrui la Labirinton.
53. Bonvolemo — bona esprimo por: pagi la spektatojn por la urbo, por tiamaniere provi akiri balotvoĉojn.
54. “Lukio mem ene de mi nuda staris surloke” — frazo sintakse neniel pravigebla en la originalo.
55. [...] truo en la teksto; elfalis la nomoj de la patro.
Romia ŝtatano (vira) havis tri nomojn: ekz. Gajo Julio Cezaro. La unua estas la antaŭnomo, la persona nomo. La dua, la ĉefa, estas la familia nomo. La tria, latine ‘cognomen’ (= alnomo), indikas certan subdividon inter la posteularo de multgeneraciaj familioj. Ambaŭ Lukio kaj Gajo estas plej kutimaj romiaj antaŭnomoj. — Por virinoj la aferoj statis alie: tiuj kutime havis nur la familian nomon (en ina formo), eventuale kun aldonita nombroindiko: Julia Secunda (= Dua), Julia Tertia (= Tria) k.s.
Historioj — aŭ: noveloj, rakontoj; aŭ: sciencaj verkaĵoj. La helena vorto estas plursignifa.
56. Simio — malestimata besto.
El la hunda pugo — esprimo, kiun Aristofano uzas en du komedioj: Aĥarniaj 863 kaj Ekleziazuzaj 255. La signifo estas ne tute klara. Eble ĝi rilatas al Ezopa fablo, en kiu estas rakontate, kiel hundo sin malpezigus super fasko de kano, se la kano ne pikus ĝian postajon. La hundo bojante foriris; la kano komentis: prefere bojadi de distanco ol malpurigi min de apude. — La moralo de l’ fablo estas, ke stultulojn oni tenu distance de si.

Enkomputiligita de Efthimios Mavrogeorgiadis kaj
korektita de la tradukinto en Aŭgusto 2004.
Distribuata pere de www.esperanto.gr.